

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

54-a jaro - n° 5

Septembro 1962

Oktobro 1962

Demandu provveturon per  
la nova

# Ford Anglia

LA PLEJ BRILA EN SIA KATEGORIO



rekta distribuanto por Brugge kaj

ĉirkaŭaĵoj

## GARAGE CANADA

GULDEN VLIESLAAN 68 BRUGGE

TEL. 34611

# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

redakcio : jaumotte maurice  
roose fernand, sint-klaradreef 59, BRUGGE tel. (050) 319.81  
maertens grégoire

kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :

DR. POL DENOËL  
BRUNO DENOËL

ISERENTANT ROGER  
POUPEYE CHARLES

COUWENBERG F.  
DE CUYPER GEORGES  
DE MARRÉ LUC

ADMINISTRADO :

TERRYN J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO SEN PROFITA CELO

DE BRUYNLAAN 44, WILRIJK tel. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD  
JAUMOTTE MAURICE

ĜENERALA SEKRETARIO

DE MARRÉ LUC, GROENENDAALLAAN 232, ANTWERPEN tel. (03) 411912

SEKRETARIO POR LA FLANDRALINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS tel. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORTODOI, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINOJ

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT  
PORKONGRESA : PLYSON J. 24, PLACO E. FLAGEY, BRUSELO 5 P.K. 236804

REPREZENTANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

COUWENBERG F., KONINGINNELAAN 14, BLANKENBERGE  
P.K. NR 416135


POŝTKONTO DE B.E.F. :

1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT



„Agadi per lernolibroj, anoncoj  
k.t.p. estas tre bone kaj necese;  
sed tio ĉi devas havi lokon **apud**  
la literaturo kaj ne **anstataŭ** la  
literaturo.”

L. L. Zamenhof



INTERNACIA REVUO  
PRI LITERATURO  
FILMO TEATRO

aŭtuno 1962

# MONDA KULTURO

PACO & JUSTECO

sekcio Bruĝo de B.E.F.

jubileas

pro 25-jara ekzistado

festas

Drs Roose F. &

Iserentant R.

fondintojn

PROGRAMO

*dimanĉo 4 - 11 - 1962*

9 h

*S. Meso en la basiliko de  
la S. Sango, Burgplaats*

10,30 h

*akcepto fare de la urbestro  
en la urbodomo*

11 h

*festparolado en la urbodomo*

13 h

*bankedo en Mayfair,  
Predikherenstraat, 40*

15 h

*transdono de memorajo al la  
gemembroj de Paco & Justeco*

ĈIU ESPERANTISTO estas kore invitata al ĈIUJ aranĝoj  
ĜIS LA 13-a-HORO. ENSKRIBO POR LA BANKEDO tamen NUR povas  
okazi kontraŭ pago de 200 ₣ al ₣-ino S. DE KONINCK, ONT-  
VANGERSTRAAT, 2, BRUGGE, pk n<sup>o</sup> 4090.74 plej laste la 22-10-62



**L**a Esperanta literaturo estas la sola literaturo vere internacia. La literaturo de Esperanto prezentas la plej altan atingon de la Internacia Lingvo.

**T**amen la kulturo inkluzivas, krom literaturo, ankaŭ aliajn fakojn : teatro, filmo, baledo, la artoj. La esperantistoj interesiĝas pri tio, kio okazas en la tuta mondo, aparte sur la kampo de la diversaj kulturaj manifestacioj.

**U**niversala Esperanto-Asocio estas la neŭtrala internacia organizaĵo de la esperantistoj; estas do nature, ke U.E.A. eldonu ankaŭ kulturalan revuon kiel organon de la internacia kulturo de la esperantistoj. Tiu revuo informos siajn legantojn pri elstaraj okazaĵoj en la kultura mondo; samtempe ĝi kontribuos al la plua disflorigo de la originala literaturo de la Internacia Lingvo.

**E**kde la aŭtuno 1962 regule aperados la kultura revuo de U.E.A. :

## **MONDA KULTURO**

**MONDA KULTURO** aperos kvarfoje jare, laŭ la sezonoj, sub redakto de William Auld. La unua numero eliros la 15an de oktobro 1962. Ĝiaj kunlaborantoj inkluzivos la plej elstarajn verkistojn en la lingvo Esperanto; krom tio, la revuo kuraĝigos kaj instigos novajn talentojn.

**MONDA KULTURO** estos ilustrita, havos la saman formatoŝ kiel la revuo "Esperanto", kaj celos atingi la plej modelan lingvan nivelon. La abono al "Monda Kulturo" kostas 15 ned. gld. (60 st.). Ni invitas la subtenon de ĉiuj esperantistoj. Plenu kaj forsendu HODIAŬ la suban abonilon.

---

Al : **Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM-2, Nederlando.** Banko : R. Mees & Zoonen, Rotterdam. Poŝtĉekkonto de U.E.A. : 378964 Nederlando.

Mi abonas al la unuaj kvar numeroj de "MONDA KULTURO", kaj samtempe mi sendas 15 gld. aŭ ekvivalenton..... per .....

Nomo (majuskle) : .....

Strato : .....

Urbo : ..... Provinco : .....

Lando : .....

Dato : ..... Subskribo : .....



## Eldonejo-librejo SONORILO

Blankenbergsteenweg, 72  
Brugge  
P.C. Nr 1521.40

Aĉetu (kaj legu!) almenaŭ unu libron, laŭ via prefero kaj fako kaj gusto, el jena riĉa kolekto:

- A) *Novaj eldonoj*:  
 "La Marvirineto" de H.C. Andersen 110.— F  
 Luksa eldono kun 20 plenpaĝaj kolorilustraĵoj.
- B) *"Stafeto" eldonoj*:  
 "La Profeto" de Kahlil Gibon 50.— F  
 "Specimene" de H. Beupierre, tre spritaj parodioj! 75.— F  
 "Planlingvaj Problemoj" de W. Gilbert; kun antaŭ-  
 parolo de Dr. W. Manders 50.— F  
 "Junaĝa Verkaro" de Prof. Dr. Edm. Privat 60.— F  
 "Proverbaro Esperanta" Dr. L.L. Zamenhof; reeldo-  
 no per la zorgo de Cam. Rogister 75.— F
- C) *Libroj por infanoj*:  
 "Liliputo" (= unua vojaĝo de Gulivero) laŭ la fama  
 verko de J. Swift 45.— F  
 "Alko kaj Suna en siaj du dometoj" (multilustrita) 55.— F
- D) *Aliaj*:  
 "Sageoj kaj Rakontoj laŭlonge de la Rejno" 40.— F  
 "Edelvejso" de Nisimuro-Masao (poemoj) 70.— F  
 "Koloroj" de J. Baghy (sufiĉe fama!) 43.— F

**Firma Van Iseghem & Verstraeten,**  
P.V.B.A.

**ST BERNARDSE STEENWEG, 631 HOBOKEN**

VITRALOJ - SPEGULOJ - „SECURIT“ VITRO  
 KOLORIGITAJ VITROJ  
 ALUMINIAJ SENMASTIKAJ STANGOJ POR  
 KUPOLOJ

VITRO-CEMENTO POR TUTVITRA-KONSTRUJAŬOJ  
 MASTIKO

telefono 37.88.20

Het Grieks Ministerie van Nationale Opvoeding & Godsdienst stelt een voorbeeld. Le Ministère d'Éducation Nationale et de Religions en Grèce donne un exemple.

La estraro de la Helena Esperanto-Asocio sendis al ni kopion de dokumento kies traduko en Nederlanda kaj Franca lingvoj tie-ĉi sekvas. Ĉiuj niaj gemembroj kaj gelegantoj povos uzi tion kiel propagandon por venontaj kursoj kaj por atentigi oficialajn instancojn en la lando.

### KONINKRIJK GRIEKENLAND

Ministerie van Nationale Opvoeding en Godsdienst  
 Directie van het Middelbaar Onderwijs  
 Sectie: Bestuur

Registratienummer 70980

Nr. v. omzendbrief: 204

Athene, 26.6.'62.

Aan de Heren Rectoren van de universiteiten van Athene  
 en Thessalonike,  
 van de E.M. Polytechnische school,  
 van de A.S.E.E.,  
 van de Pantia-school.

Aan de Heren Directeurs-Generaal van Middelbaar en  
 Lager Onderwijs.  
 Aan de Heer Directeur van de Normalschool voor  
 Middelbaar Onderwijs.

Aan de Heren Directeurs van de Paedagogische Academies.  
 Thema: "Vrijwillig Onderricht in de Internationale Taal:  
 Esperanto".

Overwegende dat een voor iedereen begrijpelijke internationale taal, zoals het Esperanto, reeds verspreid en onderwezen in vele landen, een der middelen is die ten eerste bijdraagt tot een geestelijk contact onder de verscheidene volkeren, en tot hun nauwere kennis-making en verbroedering;

herinnerend aan de vroegere omzendbrieven van onze voorgangers onder de nummers 433/28-10-32, 93096/9-10-39, 639/24-8-46 "Over het onderricht van de taal Esperanto aan de studenten en de leerlingen die het willen leren", verordenen wij opnieuw dat U in deze alle mogelijke faciliteit zoudt willen verlenen aan de professoren van het "Hoger Grieks Esperanto-Instituut" van Athene, die, zonder winst-bejag, het onderwijs van die taal op zich hebben genomen.

Aan de Directeurs van de scholen en in 't algemeen aan diegenen die inspectie hebben over de opvoeding van de studenten, de leerlingen en de onderwijzers die na het verwerven van hun diploma voortstude-ren e.a. geven wij de aanbeveling dat zij aan de leerlingen de betekenis zouden uiteenzetten van de studie van Esperanto voor de volkeren en dientengevolge van het rechtstreeks contact en van de uitwisseling van kennissen en gedachten, en dat zij de deelnemers van hun leer-



gangan zouden aanzetten het onderricht in het Esperanto met belangstelling te volgen.

De Algemene Secretaris,  
Chr. Solomonidis.

Mededeling aan de Directie van Lager,  
Middelbaar, Privaat en Hoger onderwijs.

\* \* \*

### ROYAUME DE GRECE

Ministère de l'Éducation Nationale et des Affaires Religieuses  
Direction de l'Enseignement Moyen  
Secrétariat Général

Numéro du registre 70980  
Numéro de la circulaire 204

A MM. les Recteurs des Universités d'Athènes  
et de Thessalonique,  
de l'École Polytechnique E.M.,  
de l'École "Pantia".

MM. les Inspecteurs Généraux de  
l'Enseignement Moyen et Primaire.

Au Directeur de l'École Normale de  
l'Enseignement Moyen,  
Aux Directeurs des Académies Pédagogiques,

Objet : "Enseignement facultatif de la langue internationale  
ESPERANTO".

Considérant qu'un langage international universellement compréhensible, comme l'est la langue ESPERANTO, répandue et enseignée déjà dans beaucoup de pays, constitue l'un des moyens très efficaces pour permettre aux différents peuples d'avoir entre eux des contacts spirituels, de se connaître plus intimement et de fraterniser ; rappelant les anciennes circulaires de nos prédécesseurs, notamment celles reprises sous les numéros 433/28-10-32, 93096/8-10-39, 639/24-8-46 "Enseignement de la langue ESPERANTO aux étudiants et élèves qui désirent l'apprendre", nous vous prescrivons à nouveau d'aider le plus possible les Professeurs de l' "Institut Supérieur Hellénique pour l'Esperanto" d'Athènes, qui a comme tâche d'enseigner gratuitement l'Esperanto.

Aux Directeurs des écoles et en général à ceux qui sont chargés de l'inspection de l'éducation scolaire des élèves et post-scolaire des instituteurs, etc..., nous recommandons d'exposer aux écoliers la signification que peuvent avoir pour les peuples cette étude et ses conséquences : la compréhension mutuelle et l'échange des connaissances et des idées, et de recommander aux participants des cours de suivre avec intérêt l'enseignement de l'Esperanto.

Le Secrétaire Général,  
Chr. Solomonidis.

Information à la Direction de l'Enseignement  
Primaire, Moyen, Privé et Supérieur.

\* \* \*

Ni kore gratulas pro tiu bela sukceso la estraron de la Helena Esperanto-Asocio (Adreso : Agion Konstantinon 6 Athene) kiu meritas niajn gratulojn.

## la Beneluksa esperanto-kongreso en hago

En la antaŭa numero de nia revuo ne restis sufiĉa spaco por enŝovi raporteton pri la Beneluksa Kongreso, kiu okazis dum la Pentekostaj tagoj en Hago.

Ĉirkaŭ 150 pratoprenantoj enskribiĝis por tiu-ĉi Kongreso, kiu okazis en bela parko kaj konferencejo "Overvoorde", iom ekster la urbo.

Je la 16,30a horo, sabate posttagmeze, la flago estis hisata, dum, trumpete ludata, aŭdiĝis "La Espero".

Dum la Inaŭgura ceremonio, S-ro E. Borsboom, prezidanto de la L.K.K., bonvenigis ĉiujn kaj prezentis la prezidantaron de la Kongreso. S-rojn Kervers, prezidanto de LEEN kaj M. Jaumotte kaj Debrouwere, prezidantoj de B.E.F.

La tri prezidantoj laŭvice alparolis la ĉeestantaron kaj jam ekestis tuj okazo por inviti ĉiujn al la estonta Beneluksa Kongreso en Antverpeno, dum la pentekostaj tagoj de 1963.

Sekvis ankoraŭ kelkaj salutoj, nome de UEA, FLE, KUNE, UIL ktp.

Tiam S-ro K.P.M. van Rijckevorsel, nederlanda parlemantano, kiu ĵus komencis la studadon de nia lingvo, alparolis la kongresantaron en belaj, ĉiam facile kompreneblaj vortoj.

Tiu saman sabatan vesperon, ankoraŭ paroladis D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario de U.E.A., kiu tre interese pritraktis la temon "La nuntempa junularo en la socia vivo, kun aparta konsidero al la Esperanto-movado".



La prezidanto de la L.K.K. kaj la tri asociaj prezidantoj : S-ro Kervers (L.E.E.N.) M. Jaumotte & G. Debrouwere (B.E.F.)



La dimanĉa tago komenciĝis per agrabla prelego de S-ino Ljuba Lapenna pri la fondo, la evoluo kaj la laboroj de C.E.D. Ĝi akiris viglan kaj tre personan sukceson.

Sekvis tiam laborkunsido de LEEN kaj festkunsideto de B.E.F., dum kiu la du prezidantoj honorigis la fidelulojn kaj diris sian ĝojon pro la reunuiĝo de la belga nacia movado.

S-ro M. Jaumotte, kiel ĝisnuna prezidanto de R.B.L.E., transdonis al reprezentanto de la Esperantista Brusela Grupo, la premion Antoinette Jennen.

Vespere multaj kongresanoj rekuniĝis por tre bone aranĝita festeno, dum kiu toastis S-ro Jaumotte, nome de la Kongresanaro kaj je la honoro de la L.K.K.; D-ro Lapenna, nome de UEA; kaj S-ino Kervers kiu prezidis la honoran tablon, kiel prezidantino de la Haga Grupo. Vigla balo alportis agrablan konkludon al tiu ĉi vespero.

Kaj lundon okazis aŭtoĉara ekskurso al la arbara regiono ĉirkaŭ Utrecht. Kaj post lunĉo en Amersfoort, la kongresanaro disiĝis, post adiaŭado al la L.K.K. kiu konsistis plej grandparte el junaj, aŭ ĉiukaze novaj, elementoj, kiuj faris ĉion eblan por ke la restado de la Kongresanoj en Hago estu agrabla.

Ili meritas nian grandan dankon.

M. J.

<b>G. FAES</b> Eiermarkt, 21 <b>ANTVERPENO</b> ★ Por via MUZIKO RADIO kaj GRAMOFONO	LES ENTREPRISES <b>DERKS</b> 226, Rogierstrato, BRUSELO Tel. : 15.19.92 Entrepreno de KONSTRUAĴOJ
---	--

#### La Beneluxa Kongreso 1963 en Antverpeno

En nia proksima numero, ni aperigos la nomojn de la L.K.K.-anoj por la jubilea Beneluxa Kongreso en Antverpeno.

Sed, de nun, en la diversaj grupoj, oni propagandu por tuja pago de la kotizo de F 100, kun rabato de F 25 por la familianoj-en-loĝantoj kaj por la individue aliĝontaj gejunuloj, malpli ol 21-jaraj.

La Kongreso de 1963 ja devas esti sukceso, en la plena senco de la vorto.

## PRI LA LIBRO-SERVO

Kiel niaj legantoj jam povis ekscii per la mencio, supre de la paĝo 57 de la antaŭa numero, ekzistas nun "Eldonejo-Librejo SONORILO", kun adreso Blankenbergesteenweg 72 Bruĝo, kaj kun aparta poŝtĉeknumero 15.21.40.

Tiu ĉi societo sen profita celo ek de la 30a de junio, prizorgas la laboron, faritan ĝis nun de niaj du, Belga kaj Flandra, Institutoj, kiuj daŭrigos sian laŭleĝan vivon, sed ne plu okupiĝos pri la librovendado en nia lando.

Iliaj gvidantoj konfidis tiun taskon al tiu nove starigita societo, kies statuto aperis en la "Belga Ŝtatĝezeto" de la 5a de julio: Akto 3229 paĝo 1180.

Kiel starigintoj funkciis S-roj Maurice Jaumotte kaj Gerard Debrouwere, prezidantoj de la du Institutoj, kaj Jules Verstraeten kaj Roger Iserentant, administrantoj.

Estas elektitaj kiel administrantoj S-roj M. Jaumotte, G. Debrouwere, J. Verstraeten kaj Roger Iserentant, jam administrantoj de la ĝisnunaj Institutoj, kaj D-ro Pol Denoël, grafo Georges de Cuyper kaj S-ro Grégoire Maertens; dum la kontrolo de la libroj de la nova societo estas konfidata al S-roj Charles Poupeye, Fernand Roose kaj F-ino Terry, gekomisaroj.

La Institutoj, kiuj estas je la bazo de la starigo de la nova societo, komisiis S-rojn M. Jaumotte kaj G. Debrouwere, kiel administrantojn-delegitojn, kaj S-ron R. Iserentant, kiel administranton-direktoron. Kune tiuj ĉi formas la ĉiutagan estraron. S-ro Iserentant estas la ĉiutaga direktoro kaj prizorganto.

Por ebligi la tujan ekfunkcion de la nova societo "Sonorilo", la du Institutoj metis je ĝia dispono, por la daŭro de tri jaroj, librostokon kun valoro de F 100.000, pruntedonitan egalparte de ambaŭ.

Ekde nun do, neniu plu sin direktu al la antaŭaj Institutoj por libromendoj. Ĉiuj mendoj kaj informpetoj pri libroj, iru al

Eldonejo-librejo  
SONORILO

Blankenbergesteenweg, 72  
Brugge  
P.C. Nr 1521.40



## ESTRARA KAJ ADMINISTRANTARA KUNSIDOJ

Sabaton, la 25an de aŭgusto, okazis en Bruselo: matene, estrara, kaj posttagmeze, administrantara kunsidoj de Belga Esperanto-Federacio, dum kiuj estis ekzamenataj la plej urgaj problemoj: la plia organizo de la ĝenerala gvidado de la Federacio kaj la estonta propagando.

### ESTRARO.

Ĉar la nuna estraro de B.E.F. konsistas tiun ĉi jaron el la du ĝisnunaj estraroj de la antaŭaj Ligoj kaj ĉar, iom baldaŭ, devos esti elektata la nova estraro, kiu gvidos la propagandan laboron en nia lando dum la proksima jaro, oni dum ambaŭ kunvenoj preparolis la kunmeton de tiu nova estraro.

Antaŭenmetitaj estis la jenaj kelkaj ideoj:

**Prezidantaro:** Kiel ĝenerala prezidanto estus proponata S-ro Maur. Jaumotte, helpata de du prezidantoj S-roj G. Debrouwere kaj D-ro P. Denoël, pli speciale por la du lingvaj regionoj.

**Kasisteco:** Pro la deziro de S-ino Van Herck ne daŭrigi la kasistinan laboron en la nova organizo, F-ino J. Terryn iĝus la nura kasistino de B.E.F.

Por la Kongresaj aferoj (nacia kaj universala), funkcios S-ino J. Plyson.

**KORESPONDAJ KURSOJ:** Estas akceptitaj kiel Federaciaj Korespondaj Kursoj, tiuj gviditaj ĝis nun de S-ro Vandeveld, Gento, kiu prizorgis flandralingvan korespondan kurson por Flandra Ligo, kaj de D-ro Pol Denoël, kiu, kun helpo de membro de sia grupo, jam prizorgas nun franclingvan korespondan kurson en la Lieĝa regiono.

Ambaŭ petos F 200 por tiu kurso, el kiu estos pagita firme al la Federacio F 50, dum estos finkalkulata ĉiujare la restanta profito.

Ekde nun do, ĉiu membro de la Federacio povas, en sia propagando por nia lingvo, direkti eventualajn interesitojn al tiuj ĉi du adresoj:

Nederlandlingva Kurso: S-ro Adh. Vandeveld, H. Pirennelaan 25, Gentbrugge.

Franclingva Kurso: D-ro Pol Denoël, rue Victor Raskin, 20, LIEĜO.

**PROPAGANDO:** Dum la du kunsidoj estis ekzamenataj diversaj rimedoj por antaŭenpuŝi la propagandon por nia lingvo.

Flugfolio estos presata en ambaŭ naciaj lingvoj.

La diversaj grupoj bonvolu, kiel eble plej rapide, ekzameni la tekston de projekto por represigi iam antaŭe ekzistinta prospekto.

Ili bonvolu resendi tiun tekston kun eventualaj sugestoj pri ŝanĝo kaj aldoni ĉu ili deziras firme mendi iun kvanton de tiu prospekto.

**ANONCO EN LA TELEFONLIBRO:** Laŭ la ekzemplo de la Brusela Grupo, kiu en la Oficiala Telefonlibro, menciigas « Esperanto », kiel duan mencion ĉe la prezidanta numero, la Komitato decidis instigi la grupojn kaj eventuale helpi individuajn membrojn, por ke la vorto « Esperanto » estu menciata en kiel eble plej multaj urboj.

Por akiri tiun mencion sufiĉas al la grupoj pagi F 150 al la administracio, sed la posedanto mem de la numero devas peti la duan enskribon, kiu okazu kompreneble prefere je adreso kie, se eble dum la tuta tago, estas iu, kiu povas respondi al demandoj rilate al nia lingvo kaj al la plej facila maniero ĝin studi.

**DESEGNAJA RAKONTO:** La atento estis denove vokata je la dezirindeco disponi pri desegnaja rakonto pri la vivo de D-ro Zamenhof kaj la unuaj paŝoj de Esperanto, por eventuala publikigo en tagjurnaloj.

F-ino Terryn pridemandos S-ron Demaertelaere, el Gento, pri tiu afero.

### AL LA GRUPAJ KASISTOJ.

Ni atentigas la grupajn kasistojn pri la fakto ke « Belga Esperanto-Federacio » havas, ekde nun, propran poŝtĉeknumeron, facile memorigeblan:

1634.34

La lastajn kotizojn por 1962, kiujn ili ankoraŭ akiros dum la tuj proksimaj semajnoj, ili daŭrigu sendi al la ĝisnunaj poŝtĉeknumeroj.

Sed ili, jam de nun, notu la novan numeron, por sendi tuj ĉion, kio rilatas al la jaro 1963, al tiu numero de B.E.F.

## LA BAZA LABORPLANO DE UEA.

Kiel montriĝas el la raportoj pri la Kopenhaga Kongreso, kiuj aperas en ĉi-tiu numero de Sonorilo, la komitato de UEA akceptis la novan laborplanon por la sekvonta periodo de tri jaroj, kiel ĝi estis proponita de la estraro de UEA, krom kelkaj ŝanĝoj malgrandaj. En tiu-ĉi baza laborplano troviĝas parto destinata al la lokaj grupoj, kaj laŭ la decido de nia komitatkunveno de la 25.8.62 ni publikigas tiun parton en la nuna numero, kaj petas al la grupoj dediĉi almenaŭ unu kunvenon al la pritrakto de la faritaj sugestioj, kaj sciigi al la sekretario kiujn iniciatojn la grupo povas ellabori kaj kiujn punktojn ĝi konsentas enmeti en specifa grupa laborplano. Jen la sugestioj de UEA el kiu do ĉiu grupo ĉerpu la plej konvenajn por adapti al propra laborplano:

(L.A. signifas en la sekvanta teksto: Landa Asocio, D = delegito, VD = vicdelegito kaj FD = fakdelegito.)

(a) organiza plifortigo de la societo, speciala kampanjo por membrigi malnovajn esperantistojn, kiuj troviĝas ekster la societo, aligi novajn; (b) se iel eble havigi propran ejon kaj, en ĉiu okazo, propran bibliotekon, aboni la landan organon, la revuon " Esperanto " kaj kelkajn aliajn internaciajn revuojn; (c) organizi junularon sekcion aŭ apartan junularan grupon; (d) formi landan asocion, se ĝi ankoraŭ ne ekzistas; (e) aligi ĉiujn siajn membrojn al la L.A. kaj varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn por U.E.A.; (f) prizorgi, ke en la loko de la societo kaj en la apudaj lokoj estu D de U.E.A., eventuale VD kaj kiel eble plej multaj FD precipe por la plej gravaj fakoj de scienco, edukado kaj kulturo; (g) organizi aŭ helpi la organizon de Loka Societo en la apudaj lokoj; (h) organizi Informan Fakon laŭ la Principaro de Frostavallen kaj aparte atenti la agadon en lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo (en universitataj urboj nepre vastigi la informadon en la universitato); (i) organizi konstantajn kursojn por komencantoj (intensa reklamado antaŭ la kursoj kaj progresintoj); (j) membrigi la kursfinintojn al la L.S., L.A. kaj U.E.A.; (k) en pli grandaj urboj formi aŭ sekciojn aŭ novajn societojn. La spertoj montras, ke la granda plimulto de la L.S. atingas 60—80 membroj, malofte ĝis 300, kio necesigas la fondon, en tiuj urboj, de novaj sekcioj aŭ societoj ĉu laŭ teritoria kriterio — urba kvartalo — ĉu laŭ profesia aŭ faka: junularo, studentoj, laboristoj, intelektuloj aŭ similaj grupoj; (l) okazigi regulajn ĉiusemajnajjn kunvenojn kaj konsiderinde plibonigi la programojn (prelegoj de la membroj, intersanĝo de prelegoj kun eksterlandaj grupoj utiligante tiucele ankaŭ la Magnetofonan kaj Filman Servojn de U.E.A., literaturaj vesperoj; programoj konforme al la kunlaborado de U.E.A. kun Unesko, precipe rilate al la projekto Oriento-Okcidento; amatora teatra trupeto kaj kanthoro, vivaj gazetoj, lumbildaj prezentadoj, partopreno en la organizo de prelegvojaĝoj, danc-vesperoj, amuzoj kaj aliaj distraĵoj, konstanta lingva kritiko kun la celo daŭre altigadi la lingvan nivelon); (m) senescepta kaj senkompromisa uzado nur de la Internacia Lingvo por ĉiuj aranĝoj de la L.S., inkluzive la komitatajn kunsidojn; (n) helpi al la planoj de la L.A. kaj de U.E.A. realigi la Bazan Laborplanon kaj la Organon de la L.A.



Kategorio	ĝis 31.12.1962	ĝis 31.3.63	post 31.3.63
Kongresano	560	644	728
Edz(in)o	280	322	364
Junul(in)o ĝis 20j.	350	406	462
Studentoj(20j ĝis 30j.)	210	238	280
Blindulo & gvidanto	280	322	364
Individuaj membroj de Universala Esperanto asocio pagas la jenajn sumojn :			
Kongresan(in)o	490	574	658
Edz(in)o	245	287	329

Pagu al S-ino Plyson, Bruselo, P.K. 2368.84

Se ekzistas sufiĉe da intereso, S-ro Maertens G., nia regiona sekretario organizos karavancn de el Bruĝo per aŭtobuso al Sofio, por en tri-semajna vojaĝo fari viziton al Zagrebo, Beogrado, Sofio, Budapesto, Vieno kaj Prago. Pli dat detaloj en la novembra numero de Sonrilo (daŭro, prezo k.t.p.)

**Verreries et Miroiterie DESMECHT & C<sup>o</sup>**

---

LA LOUVIERE                      S. P. R. L.                      Tel n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

**KUNLABORANTOJ DE SONORILO.**

La redakcio klopodos por aperigi la sekvontajn numerojn de la gazeto komence de la monato; tial ni ne plu petos al la grupsekretarioj kaj la aliaj kunlaborantoj por ensendi tekstojn je iu dato, sed ni preferas fiksi la limdaton de ĉiuj ensendoj je la 12-a de ĉiu monato. Ekzemple, vi ensendas por la numero de novembro plej laste la 12.10.62.

Post la konsiderinda revalorigo de nia revuo el enhava kaj teknika vidpunkto ni tre dezirus ke vi povus akurate atendi « Sonrilo »-n, sed tio iel dependas ankaŭ de vi: helpu nin. Antaŭdanke,

SONORILO.

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Kongreso 4 - 11 Aŭgusto 1962

Pli ol 1500 kongresanoj el preskaŭ 40 landoj kolektiĝis en Kopenhago por partopreni la 47-an Universalan Kongreson de Esperanto. Kelkaj alvenis du-tri tagojn pli frue kaj la plimulto sabaton. Sabaton je la 16 horo okazis en Hanna-Skolen la INAŬGIURO de la 7-a INTERNACIA INFANA KONGRESETO al kiu aliĝis 55 infanoj el 9 landoj.

Sabaton vespere en Odd-Fellow Palæet okazis INTERKONA VESPERO dum kiu renkontiĝis malnovaj amikoj kaj kreiĝis novaj konatiĝoj.

Enirante la pordon de la Teknika Altlernejo vi staras en vasta akceptejo de la 47. K., kie diligente deĵoras la anaro de L.K.K. Dekok ĝiĉetoj funkcias por kontentigi la multflankajn dezirojn de la kongresanoj el la tuta mondo.

La tuta kadro de ampleksa konstruaĵo elradias imponan dignon enhavante ĉiun komforton necesan. Tuj en la unua ĝiĉeto deĵoras la K.K.S. S-ano Pompilio, kiu per la 47-a U.K. ricevas la fajran bapton. Post ricevo de la kongresdokumentoj la vizitanto eniras la rotondon, rondan altan centron, kie li trovas aliajn ĝiĉetojn teretaĝe, kaj en la aliaj etaĝoj troviĝas diversaj salonoj, kiuj portas la nomon laŭ niaj plej elstaraj E-pioniroj.

Tuj apude deĵoras la organizantoj de la 48-a U.K., fervoraj bulgaraj amikoj, kiuj akceptis jam 30 aliĝilojn. Kelkaj konantoj de la fortoco de E-movado en Bulgarujo opinias, ke tiu kongreso estos la plej multnombre vizitata kongreso postmilita. En la kongresa poŝtoficejo deĵoras lerte S-ano A. Kolle, kiu dum la unuaj tagoj jam akceptis dek mil poŝtaĵojn (rekordo la 6-an: preskaŭ 4000 poŝtkartoj stampitaj per E-stampo kaj ekspeditaj!). Do la tuta mondo ricevas multegajn salutojn, kiuj estas samtempaj pruvoj pri la nekontestebla taŭgeco de nia lingvo.

La fervojon reprezentas S-ro H. Olsen lerte. Kiuj tuj apude aĉetas trovas S-ron S. Olesen, kiu kiel vicprezidanto de LKK ne timas laboron.

Al TEJO-kongreso aliĝis jam 80 personoj, kiuj ĝuos en Ystad distran sed certe por la E-movado ankaŭ prosperigan programon.

Kongresa Libro-Servo havas je dispono al la interesatoj pli ol 300 diversajn librotitolojn, inter kiuj precipe elstaras la eldonaĵoj de STAFETO. Tie deĵoras S-ino Lis Thune kaj s-roj Egon Starup kaj Rude Andersen hunchelpas. Tiu stando vendas ĉiutage librojn en valoro de proksimume 1500 danaj kronoj. Krom tio ŝike aranĝitan standon posedas eldoneje KOKO.

Ni ne forgesu mencii la bonan servon de SAS, kiu ne sole en aero sed ankaŭ sur la tero kapablas perfekte servi: personaro de SAS gvidas la kongresan restoracion. Ni ne forgesu la vastegan laboron de la prezidanto de LKK D-ro P. Neergaard, S-ino Kirsten Zacho, S-ro S. Ziegler, S-ro Mollerup, S-ro Dybkaer k.a.



Dimanĉon, la 5-an de aŭgusto, je la 9.30 okazis en koncerta salono en Tivoli solena inaŭguro de la 47-a Universala Kongreso de Esperanto, al kiu partoprenis pli ol 1500 kongresanoj.

La Kongreson malfermis la Aganta Prezidanto de U.E.A. kaj Prezidanto de la Kongreso, S-ro H. W. Holmes petante la Prezidanton de L.K.K. D-ron Paul Neergaard fari la bonvenigan paroladon.

S-ro H.W. Holmes eldiris dankajn vortojn al la L.K.K., kiu frontis multajn malfacilaĵojn aranĝante la Kongreson kaj per heroa persistemo venkis ĉiujn. Liajn dankvortojn sekvis longa aplaŭdo.

Sekvis salutparolado de S-ro K. HELVEG PETERSEN, Ministro pri Instruado, kiu bonvenigis amikojn el eksterlando, substrekante ke la internaciaj kontaktoj estas tre bonvenaj kiam okazas internaciaj streĉiĝoj. Mia deziro por E-kongreso estas triobla — li diris. Unue mi deziras ke vi havu bonan veteron en Danlando kaj kunportu vicon da memorajoj kiam vi revenos al via lando. Due, mi esprimas al vi bondezirojn por disvastigo de Esperanto kiel komunikilo. Tria, mi deziras al vi ke vi havu feliĉon utiliĝi vian lingvon en la paca kunlaboro kaj mildigo de internaciaj streĉiĝoj, kion deziras la granda plimulte de popoloj de la tero.

Dankajn vortojn al la Ministro kaj al Dana Registaro eldiris Prof. D-ro Hideo Yagi, vicprezidanto de U.E.A.

Post muzika punkto sekvis salutoj de la reprezentantoj de registaroj de jenaj landoj :

Aŭstrujo (reprezentanto de Aŭstria Ambasadorejo, S-ro Schultz)  
Belgio (S-ro G. Maertens je la nomo de la Ministro por instruado)  
Finnlando (S-ro Setälä je la nomo de Ministro por instruado)  
Italio (Ataŝeo S-ro Antonio Restivo)  
Brazilio

Nederlando (S-ro Inĝ. Isbrucker por la 33-a fojo, substrekante inter la sukcesojn la novan leĝon proponitan de Ministro pri Instruado kiu donas perspektivojn por instruado de Esperanto en la lernejoj)

Germanio (D-ro Brenzer kiel komisiito de Ambasadorejo de Federacia Respubliko Germanio)

Norvegujo (S-ro Støp-Bowitz en la nomo de Norvega Registaro)

Kaj je la fino S-ro Perrot, observanto de Internacia Ligo de Edukistoj, kiu venis de Kongreso okazinta en Stokholmo, kaj S-ro Yagi en la nomo de rusaj esperantistoj.

Sekvis salutoj de la reprezentantoj de la Landaj Asocioj aliĝintaj :

Aŭstrujo, Belga E-Federacio (F-ino Terryn), Brazila E-Asocio, Brita Landa Asocio, Bulgara Esperanto-Asocio (S-ro Nikola Aleksiev je la nomo de pli ol 5000 organizitaj esperantistoj, menciante ke la 35-an landan kongreson partoprenis pli ol 1800 esperantistoj, Centra Dana Esperanto-Ligo, Finnlando, Francujo (S-ro Llech Walter, informante ke en 60 francaj lernejoj estas malfermita kurso de Esp-o), Germanujo, Greklando, Hispanujo, Hungarujo, Israelo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Madagaskaro, Nederlando, Norvegujo, Nov-Zelando, Svedujo, Svislando, Usono.

Sekvis salutoj de Landaj Asocioj nealiĝintaj al U.E.A. :

Ĉeĥoslovakio, Etiopio, Hindujo, Islando, Libano, Meksikio, kaj 55partoprenantoj de la Infana Kongreseto.

Post muzika punkto sekvis festparolado de D-ro Ivo LAPENNA.

Post la himno finiĝis la inaŭguro kaj sekvis komuna foto.

Sekvis la jenaj programeroj :

**Inaŭguro de la 32-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj** okazis en Blindula Instituto.

**Kvakera Esperantista Societo** — havis sian jarkunvenon.

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj** okazigis sian komitatan kunsidon, sub prezido de F-ino Jeanne Dedieu, kiun ĉeestis 15 personoj. La tagordo ampleksis 25 punktojn. La ĝenerala sekretario de IFTA informiĝis pri la eblecoj utiliĝi kaj apliki Esperanton en la laboro de tiu internacia organizo. Lian intereson vekis s-ro Malmgren el Sv edujo per parolado en ilia kongreso en Stokholmo tuj antaŭ la kongreso en Kopenhago. S-ro Malmgren skribis al la prezidantino, ke li sin prezentis kiel oficiala reprezentanto de ILEI por ricevi la eblecon alparoli la kongreson en la nomo de la esperantistoj. La IFTA-kongrese decidis plue esplori la problemon pri la uzado de Esperanto, kaj la ĝenerala sekretario de la organizo, s-ro Perrot, ĉeestas la Universalan Kongreson kiel observanto.

En Polujo finiĝis kurso por 52 instruistoj, kiuj pli-malpli jam sciis Esperanton, sed kiuj deziris kapabliĝi gvidi kursojn.

Tiun kurson la ŝtato subtenis tiel, ke ĝi iĝis por la partoprenantoj tre malmultekosta.

La Ligo decidis kiel ĝis nun esti kun UEA kunlaboranta asocio kaj laŭeble plenumi tiujn punktojn en la propono pri nova laborplano por UEA, kiuj koncernas fakajn organizojn.

La kunveno decidis esprimi koran kaj respektplenan dankon al la antaŭa sekretariino, f-ino Nixon, kiu pro malsano devis forlasi la estraron. Oni elektis sin honora membro de la Ligo. Nova sekretario fariĝis Oskar Svantesson kaj nova kasistino s-ino Alide Leijder, ambaŭ el Svedujo.

La Internacia Esperanta Virina Komitato — elektita en Varsovio — aranĝis renkontiĝon kiun ĉeestis 35 geesperantistoj.

**Nacia Spirita Konsilantaro de Bahaanoj** okazigis fakkunvenon.

**Akademio de Esperanto** havis nepublikan kunvenon. Ses akademianoj el ses landoj kunvenis por neformale diskuti diversajn organizajn problemojn de nia supera lingva institucio. La pli grava diskuto okazis pri la neceso revizii la ĝisnunajn statutojn, kiuj ne plu montriĝas adekvataj al la nunaj kondiĉoj kaj ne permesas doni al tiu nia institucio, en la okuloj de la ekstera mondo, la necesan aŭtoritaton. Ĉiuj ĉeestantaj akademianoj konsentis ke estu rekomendite al la Akademio studi la problemon.

**Internacia somera universitato** : Dum la inaŭguro d-ro Paul Neergaard, rektoro de ISUE, donis koncizan enkondukon pri la temaro de la ĉijaraprelegaro — ĉiuj rilatantaj al la lingva problemo en la scienco, kaj prezentis al la publiko la prelegontojn, kiuj sidis cirkaŭ la podio. La granda salono estis plena de kongresanoj.

**La unua prelego de I.S.U.** : Prof. d-ro Ivo Lapenna prezentis la



lingvan problemon en internaciaj rilatoj en kompara kaj internacia juroj. Unue li donis koncizan historian trarigardon pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj. Post tio prezentis la nuntempan lingvan situacion en la ĉefaj interŝtataj organizaĵoj kaj en diplomatio. Problemoj renkontataj: teknike lingvaj, politikaj, ekonomiaj kaj sociaj. La matureco de la Internacia Lingvo por la nuntempaj internaciaj rilatoj. Interna, kompara kaj internacia juroj. Malsameco de la lingva problemo en diversaj juraj branĉoj. Terminologiaj problemoj sur la kampo de kompara juro kaj pli simplaj problemoj en la sfero de internacia juro. Juraj terminaroj en la naciaj lingvoj kaj en Esperanto. Taŭgeco de la Internacia Lingvo por la jura scienco.

## LUNDO 6.8.'62

**En la kadro de I.S.U.** okazis prelego de D-ro P. NEERGAARD pri lingvaj problemoj en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj, kiun partoprenis proksimume 120 personoj. La preleganto akcentis ke la postmilita plivastiĝinta uzado de la angla lingvo en la scienco nur ŝajne kondukis al pliiĝinta lingva unueco. Fakte okazas, ke valora scienca literaturo de gravaj lingvoregionoj estas nete neglektata. Ne egalas unuflankeco al unueco. Latino kontentige funkcias kiel nomenklatura lingvo en la biologio, dum ĝi kiel normlingvo por diagnozoj (priskriboj) antikviĝis. La nomenklaturado de la kulturplantoj (varinoj) prezentas grandan lingvan konfuzon.

Pli ampleksa resumo troviĝas en la Temaro de la Scienca Konferenco, kaj la tuta prelego tre verŝajne estos — kune kun aliaj valoraj prelegoj — presita en "Scienca Revuo".

**Unua ĝenerala kunveno de U.E.A.** okazis en la salono UNESCO sub prezido de S-ro Harry Holmes kaj partopreno de ĉirkaŭ 400 personoj. La diskutemo estis la rolo de la lokaj grupoj en la nova laborplano de U.E.A.

La diskuton enkondukis Prof. I. Lapenna kaj raportis mallonge pri la atingoj de UEA en la realigo de la antaŭa laborplano aprobita en 1955. Komisiono de la Komitato de UEA estas diskutanta la laborplanon, kaj ŝatus scii el la nuna kunveno, ĉu ĝi devas trakti entute la punktojn rilatantajn al la landaj asocioj kaj la lokaj grupoj. Post energiaj intervenoj de 11 personoj, preskaŭ ĉiuj en la nomo de sia landa asocio, oni voĉdonas, ĉu la laborplano enhavu tiujn punktojn aŭ ne. Estas du voĉoj por "ne", sep sindetenaj, ĉiuj aliaj por "jes". Tial oni tuj transpasas al la komentarioj kaj sugestoj de punktoj 13 kaj 21 de la laborplano, kiuj rilatas al la tagordo. Tre interesaj paroladoj sin sekvas ĉe la mikrofono: tre valoran dokumentaron, eventuale poste eldonotan, prezentas S-ro Bertolotti el Italujo. Tre valorajn kaj praktike utiligeblajn sugestojn proponas S-ro Strønne el Svedujo, S-ro Olsson el Svedujo kaj S-ro Antonije Sekelj el Jugoslavio. Aliaj proponoj venas de S-ro C. Minnaja el Italujo, S-ro Uspienski el Pollando, S-ro H. Breitenbach el Germanujo, kaj raportoj el Brazilo, Germanujo, Portugalujo, Pollando kaj Italujo. Tre interesaj estas la vortoj de

Prof. Yagi, kiu promesas, ke en venontaj 3 jaroj la membroj-abonantoj de UEA en Japanujo duobliĝos. Prof. Lapenna faris superrigardan paroladon pri la iama agado de la Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb, preparolante multajn eblecojn de agado kaj promesante, ke aperos konciza artikolo pri tio en unu de la venontaj n-roj de "Esperanto". Tre interesaj estas la finaj vortoj de S.S. Mahant el Hindujo, kiu raportis pri la rezultoj jam atingitaj kaj pri la varmkcraj esperoj de la esperantistoj en Hindujo kaj en aliaj aziaj landoj. Li petis subtenon al ĉi tiuj tre junaj novaj grupoj kaj ke UEA sendu pli multajn klerajn homojn kiuj informu la lokan medion pri Esperanto.

**Unua kunveno de la ornitologia rondo esperantista** okazis sub prezido de S-ro W. De Smet.

I.S.U. okazigis prelegon de Prof. D-ro B. Popoviĉ pri lingva problemo en matematikaj kaj fizikaj sciencoj. Partoprenis 90 personoj. En sia prelego li pritraktis lingvan problemon dum sciencaj kongresoj, eldonadon de scienca literaturo kun malgranda eldonkvanto kaj ĝia komprenado eksterlande (precipe la literaturon el astronomio), interŝanĝon de pedagogiaj spertoj pri instruado de matematikaj kaj fizikaj sciencoj internaci-skale, lingvoproblemon en tekniko kiel aplikata fiziko kaj kemio kaj terminologiajn problemojn kaj la pontlingvon. (Resumo en Temaro de la Scienca Konferenco).

**La Urbeŝtaro de Kopenhago** akceptis reprezentantojn de la Kongreso en Urba Domo, kie Urba konsilanto S-ro Ib Kolbjørn bonvenigis la kongresanojn. En sia parolado li substrekiis, ke estas grave ke okazu reciprokaj interŝanĝoj ne nur de gvidantoj sed ankaŭ de homoj ĝenerale, precipe junularo kaj instruistoj. Por povi rekte kontaktigi estas necese havi rimedon, kaj tiurilate estas grava la agado de esperantistoj. Al li dankis S-ro H.W. Holmes, la Aganta Prezidanto de U.E.A. Post tio sekvis regalo kaj vizito de la Urba Domo.

**Teatra vespero:** En Falkonerteatert la Internacia Arta Teatro prezentis renesancan komedion de Marin Drjiĉ "Onklo Maroje".

*Sekvo de la kongresa raporto en la novembro numero.*

## NI REMEMORIGAS...

LA KOTIZOJ PAGOTAJ DE LA INDIVIDUAJ MEMBROJ ESTAS POR 1963 JENAJ:

BONFARA MEMBRO	150 F
MEMBRO (KUN ABONO)	100 F
FAMILIA MEMBR(IN)O	50 F
JUNULOJ (18 ĜIS 21-JARA)	50 F
KADETO (ĜIS 18-JARA)	25 F
KURSAŬOJ	50 F
ABONOJ	80 F

POŝTKONTOJ

B.E.F. N° 163434 RAAPSTRAAT, 72 GENTO



## KRUCVORTENIGMO N° 1.


Jen unua problemo, kies solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.

Ni scias ke multaj ŝatas krucvortenigmojn, kiel lernigan tempopas'gilon, sed neniam ensendas solvon!

Sed kiel vi volas ke ni sciu ĉu tiu rubriko interesas vin?

Do sendu nepre vian solvon al: Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo.

*Noto pri la difinoj:* La apostrofo (') montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.




### DIFINOJ

#### Horizontale:

1. Pli ol unu oni ricevas ĉirkaŭ Novjaro.
2. Manĝebla fiŝo — Malkonfesis
3. Gramatika finaĵo — Plej respektgind'
4. Urbo en Francujo — Sovaĝa bov'
5. Regula aranĝ' — artikolo
6. Entenas parte — Pensaj'
7. Litero
8. Rakonta poezio — Page pruntepren'
9. Prepozicio — Speco de rezon'
10. Aparato elektromagneta.

#### Vertikale:

1. Veturilo.
2. Teknika sufikso — Mezur'
3. Scienco
4. Malsano — Certe kon'
5. Litero — Sufikso — Litero.
6. Du unuaj konsonantoj de bone konata titolo — Iu nenomita objekto — Prepozicio.
7. Juna naĝbird' — Grava mebl'
8. Organ' — Malgranda estaĵo.
9. Nerva person'
10. Juĝo ĉe la Atenanoj.



# RECENZOJ



Charles VIVIAN «Amuzo per Scienco». El la Angla tradukis D.R. Duncan Ph. D., B.Sc. Eldono de Associated Newspapers Limited, London. Enbindita libro de 96 paĝoj, grandeco 25 x 19 cm. Prezo: 756p.

Tiu mondfama firmo, eldonanto de i.a. «Daily Mail», kiu jam eldonis en Esperanto la tre belan libron «Bild-Libro pri bestoj», nun rec surprizas nin per tiu-ĉi egale bela kaj tre utila eldono. Mi kredas ja ke nenio pli celtrale povos instigi niajn junajn geknaboj por lerni esperanton ol tiu-ĉi publikaĵo. Prezento tre alloga, tiel ke ĝi ornamas bibliotekon. Multaj desegnoj. Kaj, laŭ tre amuza maniero ĝi enkondukas niajn junajn gelearnantojn en la mondo de la naturscienco. Efektive ne malpli ol 75 provoj estas montrataj kiuj surprizas per la tute ne atenditaj sekvoj; kiuj ofte kore ridigas! Por tiel bela kaj utila eldono la prezo estas tre malalta! Ni insistas je tio! Ni ĵus eksciis ke tiu firmo ne havas sukceson en la vendado de la unua «Bildlibro pri Bestoj»! Tio estas ne nur bedaŭrinda el propaganda vidpunkto kaj por nia famo ĉe la eldonejo, sed, se konsideri nur la utilon kiun la esperantistoj havas per tiu eldono, ĝi estas eraro! Ni faras varman alvokon ke la samideanoj aĉetu tuj la du librojn. Ni garantias ke ili ne bedaŭros.

D-ro ERNST OLSSON «Kredo, Floroj kaj Dinamito». Eldono de la «Eldona Societo Esperanto» en Malmö; 80 paĝoj; prezo por la broŝuro: 4,75 sved. kronoj kaj por la enbindita libreto: 8,50 sv.kr.

La juna Sveda fizikisto kaj instruisto E. Olsson laboris super ampleksa manuskripto de svedaj kulturpersonoj, Malfeliĉe, li mortis juna. La manuskriptoj estis ne jam prespretaj. Tial tiun-ĉi trion redaktis Gösta Henrikson. La ideo konatigi al la ekstera mondo la grandajn figurojn de sia popolo estas bonega ideo kaj respondas komplete al la celoj de Zamenhof kaj de la esperantismo. Kiuj de niaj talentaj verkistoj foje konatigos kelkajn Flandrajn kaj Valonajn grandulojn? ni ja havas ankaŭ tiajn kiuj pliriĉigis la mondan kulturon.

Sub «Kredo» ni konatiĝas kun Sankta Brigitta. Ŝi okupas ne multa da loko en la libreto; de paĝo 6 ĝis 18. Tamen ŝi vekas scivolemon al pli detala priskribo de ŝia vivo pro la fakto ke ŝi aktive partoprenis en la problemo de la papoj de Avignon.

Sub «Floroj» ni renkontas la faman Karl von Linné (1707-1778) kiu kompreneble pensigas nin al nia fama Mehlenano Rembert Dodoens. Tiu biografieto estas, laŭ ni, la plej bone sukcesinta. Ni ekscias multajn interesajn detalojn. Por doni unu ekzemplon: legu sur p. 41 kiel oni doktoriĝis en Harderwijk; kaj, sekve, kia estis la scienca okupigo, ankoraŭ en la 18a jarcento! La Flandroj scias ke la patronino de la Flandra movado, sankta Lutgardis (1182-1246), ne kapablis lerni la Francan lingvon. Ili ne kredu ke la kazo estas unika! Sur p. 45 ni ekscias ke Linnaeus ne kapablis lerni la Nederlandan lingvon! Kelkfoje ni havas la impreson ke la aŭtoro senkritike transprenas diraĵojn el antikvaj fontoj. (ekz. sur p. 47)

La tria parto «Dinamito» temas pri Alf. Nobel. Tiu parto estas ankaŭ tre interesa! Ni varme rekomendas.

Drs. F. R.



# GRUPA VIVADO

## MENCIINDA.

En nia antaŭa numero, ni havis la plezuron gratuli du karajn gesamideanojn G-rojn Jan Jacobs, pro ilia ora geedziga jubileo.

Hodiaŭ, ni aldonu ankoraŭ unu plian gratulon al nia bona samideano, kiu, dum Kongreso en Vieno, estis elektata, kiel ĝenerala tutmonda prezidanto de la Societaro por Bestprotektado.

Tio estas ne rekompenco, sed konkludo de multaj jaroj da dediĉado al tiu bela propagando por pli « humana » konduto kontraŭ la bestoj... Ankau konsekro de multaj jaroj da zorgoj, mem dediĉitaj al bestoj... ĉar tiel longtempe kiel ili vivas kune, G-roj Jacobs estis amikoj de la bestoj.

Ke ili ankoraŭ longtempe povu daŭrigi !

## ANTVERPENŬ

Esperanto-Grupo « La Verda Stelo »

Poŝtĉeknumero: 726.54

La 1an de junio S-ro R. Van Eynde faris belan paroladon pri « La folkloro Muziko tra Eŭropo ». Per magnetofono kaj per la sonoj de plurfoje rava muziko, oni faris vojaĝon tra preskaŭ la tuta malnova kontinento. Muzikaj, popoldanemuzikaj kaj -kantoj alternigis kun la klara komentario de la paroladisto. Estis bela vespero.

La 8an S-ro H. Vermuyten, kiel vera spertulo kaj okaze de jubileo en publika Antverpena servo, faris amuzan kaj humorplenan paroladon pri « Centjara jubileo de la publika purigado en Antverpeno ». Multaj « pursangaj » antverpenanoj miris pri la dekoj da sciindajoj — plej grandparte folkloraj — kiujn la paroladisto per pitoreska lingvo sciigis en tiu pli ol unu hora parolado.

La 9an, 10an kaj 11an okazis en Hago la 8a Beneluksa Kongreso al kiu 15 verdstelanoj partoprenis.

La 15an S-ro Eug. Paesmans gvidis promenadon tra malnova kvartalo de la urbo kiun ĉeestis pli ol 30 personoj. Oni vere ĝuis la klarigojn de spertulo kiel S-ro Paesmans kaj laŭ propono kaj aranĝo de S-ino E. Riadis la promenado akiris sian konkludon en greka kafejo, kie oni havis okazon admiri diversajn grekajn dancojn kaj muzikajn.

La 22an, post ekzameno, 5 gelernintoj de la elementa kurso ricevis sian diplomon dum solena diplomsidono: S-ino A. Sloodmans, S-ro M. Coenen, F-ino H. Janssens, S-ino D. Duwel kaj S-ino D. Coenen. S-ro Maur. Jaumotte faris la solenan paroladon. F-ino H. Janssens, nome de la gelernintoj, dan-

kis la profesoron S-ron H. De Roover, kaj transdonis belan donacon post kiu tiu ĝi lasta redankis per sinceraj kaj afablaj vortoj. Dum dua parto de la vespero S-ro Roger Jaumotte organizis sian konatan kaj ĉiam ĝuindan kulturan distran vesperon kun la sama sukceso kiel antaŭe.

La 29an S-ro R. Balleux raportis dum interesa parolado pri « Mia printempa libertempo en Svisujo » kaj, helpe de projekcio de multaj poŝtkartoj kaj vigla komentario, li sukcesplene kaptis la atenton de la aŭdantaro dum pli ol unu horo.

Dimanĉon, la 1an de julio, en la kadro de EKI, S-roj C. Borremans kaj Eug. Paesmans organizis « Promen-Radio ». Kvankam estis eksperimento la rezulto estis kontentiga. Diversaj taĉmentoj partoprenis kaj solvis la problemojn dumvoje por finiĝi la tuton en la sidejo « De Witte Leeuw », kie la Prez. Maur. Jaumotte disdonis la multajn premiojn, senpage disponigitajn de la diversaj antverpenaj grupoj. S-roj C. Borremans kaj E. Paesmans certe meritas plenan laŭdon pro sia iniciato!

La 6an S-ro R. Van Eynde denove prezentis dokumentajn filmojn, inter kiuj unu en Esperanto. Tiu lasta realiĝis dank' al la kunlaboro de S-roj H. Vermuyten (tradukanto), I. Durwael (parolanto) kaj J. Montmirail kaj J. Verstraeten (teĥnikistoj). Pro la sinsekva prezentado de Esperante parolataj filmoj laŭ « Verd-Stela-sistemo », oni jam akiris bonegan rezulton. Pro la ĉiam pli kaj pli kreskanta teĥnika sperto, la lerteco de S-ro J. Montmirail preskaŭ garantias perfektan sinkronizon de filmo kaj sonbendo.

La 13an F-ino Cl. Peeters, S-roj F. Schellekens kaj J. Vertsraeten antaŭ-

legis, en speciala dekoro kreita de S-ro F. Schellekens, la ĉiam viv-restantan teatraĵon « Bietje » kun plena sukceso. Antaŭe S-ro Maur. Jaumotte faris enkondukon pri la aŭtoro Maurits Sabbe kaj pri la diversaj prezentadoj en Esperanto dum la antaŭaj jaroj.

La 20an F-ino M. Hofkens, S-ino M. Lemmens, S-roj E. Clacs, I. Durwael, H. Tiepermann kaj R. Van Eynde zorgis, ke la « Cirkaŭ la Fajro » denove iĝis sukceso.

La 27an dum distra vespero, la gemembroj amuziĝis per vortenigmoj kaj Esperantaj lud-kartoj.

La 3an de aŭgusto dum la parolata ĵurnalo S-ro Fr. Schellekens faris vortan kaj diapozitivan raportadon pri la Beneluksa Kongreso en Hago kaj sia vojaĝo al Kapri.

La 10an raportadis pri sia libertempo: F-ino Bl. Geers vojaĝinte en Italujo, S-ro J. Jacobs pri Salzburgo kaj Vieno, kaj S-ro E. Paesmans pri Parizo.

Malgraŭ la anonco ke la 17an ne okazus kunveno pro Antverpena Kermeso, tamen oni aranĝis kunvenon specialan ĉar Japana korespondanto de S-ino G. Debacker, nome D-ro Cukasa Kobayaŝi, estis vizitanta Antverpenon. Li faris tre interesan paroladon per kolorigitaj diapozitivaj pri sia fama lando kaj respondis al amaso da demandoj. Tiel montriĝas la vigla intereso de la multnombra ĉeestantaro, kiu cetere kore dankis per varma aplaŭdo. Plie S-ino G. Debacker sin konigis kiel bonega gastigantino gvidante la japanan samideanon tra la urbo kaj eĉ fugante helikoptere al Bruselo.

La 24an, dum distra vespero, oni denove praktikis la vortenigmojn kaj la Esperantan kart-ludadon.

JAS = Junulara Antverpena Sekcio.

La JAS-anoj regule kontaktas kun interesitaj gejunuloj pri Esperanto kaj la gvidanto S-ro Ivo Durwael sukcesis jam formi kernon, kiu regule kunvenas en sia domo, Dolfijnstraat, 77 Antverpeno. Pro la somera kaj libertempa periodo la aktiveco mem stagnas. Tamen iom post iom planoj formiĝas, kies realiĝoj estas antaŭvidataj por la venontaj monatoj.

## FILM-RUBRIKO.

La teĥnika sekcio de « La Verda Stelo » daŭrigas la esperantigon de kolorigitaj dokumentfilmoj 16 mm. Ĝi aldonas sekvantajn ekzemplerojn al la antaŭa listo:

4. La Perlo de la Golfo (De Parel van

de Golf — La perle du Golfe) 25 min. Mendebila al: Sofedi, Renbaanlaan, 147 Av. de l'Hippodrome, Bruselo 5 (almenaŭ 45 semajnoj antaŭe). Senpaga, nur la sendkostoj.

5. Vojaĝante tra la Filipin-Insuloj (Op reis in de Filippijnen — Voyages aux Philippines) 30 min. Mendebila: kiel supre.

6. 24 Horoj en Stokholmo (24 heures à Stockholm) 23 min. Mendebila al kaj senpage akirebla en la konsulejo de Svedujo en Antverpeno, Frankrijki, 123 (45 semajnoj antaŭe).

La sonbendoj kun Esperanto teksto ĉe S-ro J. Verstraeten, St.-Bernardsesteenweg, 1078, Hoboken.

## BRUGO

Bruĝa Grupo Esperantista, Reĝa Societo (Poŝtĉekkonto N° 4835.33)

Dum la tuta printempa kaj somera periodo, la kunvenoj daŭriĝis regule ĉiumarde.

La 3an de aprilo, F-ino, Y. Poupeye gvidis interesan konkursludon, daŭrigatan la 18-an, pri muziko, geografio, historio, ktp. « Sonorilo » estis laŭtleĝata kaj komentariata dum la kunveno de la 11-a S-ro J. Eneman, gvidis alian konkurson, la 25an, sub titolo « Lingvaj Ludoj ».

La 1-an de majo, ne okazis kunveno, sed la 8an okazis komuna priparolado de la V-tago, kaj la 15an, S-ro Ch. Poupeye, loka UEA-del., donis informojn pri diversaj servopetoj. La tria numero de « Sonorilo » estis laŭtleĝata kaj komentariata la 22an de majo, dum ke la 29an okazis debato pri programkunmetado.

La 5an de junio, S-ro Ch. Poupeye paroladis pri la biblia legendo pri la ripo de Adamo kaj ĝiaj modernaj klarigoj. F-inoj I. Van Parys kaj Y. Poupeye, reveninte el la Beneluksa Kongreso en Hago, detale raportis pri ĝi, le 12an de junio. Tiu raportado estis kompletigata la 19an, ankaŭ de F-ino M. Willems, kiu plie raportis pri ŝiaj ekskursoj al Rotterdam, Amsterdam kaj Delft.

La 26an, F-ino Y. Poupeye raportis pri marvojaĝo al graflando Kent en Anglujo kaj S-ro Ch. Poupeye komentaris gravan gazetartikolon pri nova libro de S-ro Pierre Burney: « Les Langues internationales ».

La 3an de julio, S-ro Ch. Poupeye paroladis pri la « Ordeno de la Ora Safofelo » kaj la 11-an, S-ro Marcel Poupeye priaktis detale la « Deveno(n) de



Asekuro». La 17-an okazis ĝenerala raporto pri la vizito de la gereĝoj en Bruĝo, okazinta le 15an. Dum la kunveno de la 24a kaj 31a de julio kaj ankaŭ de la 7a de aŭgusto, la ĉeestantoj interŝanis impresojn pri la Ludo de la Sankta Sango kaj esperante kartludis per la ludo «Leksikon». La 14-an de aŭgusto, la ordinara kunveno estis anstataŭata per 32-opa vizito al la ekspozicio de la Ora Safofelo, sub tre kompetenta gvidado de S-ro Carlos Vlaemyneck. Komitata kunveno okazis vendredon 17an de aŭgusto, por prepari la vintran agadon, kiu estis detale prezentata dum la ordinara kunveno de la 21a. Fine, la 29-an de aŭgusto paroladis F-ino M. Willems, pri ŝia vojaĝo tra Norda Germanujo, kun montrado de multaj dokumentoj.

#### Familia Kroniko

**Kondolencoj** al F-ino M. Willems, komitatanino de BGE, pro morto de ŝia patrino, S-ino Willems-Vanhaverbeke (30.3.62).

**Gratuloj** al Ges-roj D. Demeulenaere-Verstrynghe, respektive vicprez. kasisito kaj membrino de BGE pro naskiĝo de fileto Rik (14.5.62).

#### Programo por venontaj kunsidoj.

Ciumarde, en Strijdershuis, Hallestraat, (Tel. N° 347.98), je la 20a: kurso, je la 21-a: kunveno laŭ suba programo:

SEPTEMBRO: 18-an: Unua kaj prepara kunveno de la nova kurso por komencantoj. — 25-an: Tra Eŭropo per kolordiapozitivaj: F-ino Y. Poupeye.

**Ekster programo:** jaŭdon, 27an: komuna kunveno por ambaŭ Bruĝaj grupoj; parolonto: S-ro M. Jaumotte, Prez. BEF, pri «Deklanda Vojaĝo».

OKTOBRO: 2-an: Konkursludoj, S-ro J. Eneman. — 9-an: Muzikaj sukcesoj: F-ino Y. Poupeye. — 16-an: Filmvespero. — 23-an: Krucvortenigmo: S-ro Ch. Poupeye. — 30-an: Rememoro pri Heidelberg: S-ro J. Eneman.

NOVEMBRO: 6-an: Antikvaj kuraciloj: S-ro Eneman. — 13-an: Amuza proceso: S-ro Ch. Poupeye. — 20-an: En Burgondujo: S-ino S. Verbeke. — 27-an: Vojaĝo al Sicilio (koloraj diapozitivaj): F-inoj I. Van Parys kaj Y. Poupeye.

DECEMBRO: 4-an: Sta-Nikolao-festo. Ĉiu alportu nekonatan premion. — 11-an: Zamenhof-memorigo. — 18-an: Sorĉistina proceso: S-ro Ch. Poupeye. — 25-an: Kristnasko: Kunveno ne okazos.

#### «Paco kaj Justeco» Brugge

La dekduan de aprilo ni estis la envititoj de Simonne De Koninck. Ni havis forumon de la muziko. Post aŭdigo de belegaj muzikaĵoj, la ĉeestintoj voĉdonis pri sia prefero. La dudekkvaran de la sama monato, ni preparis la universalan kongreson per «Dana Vespero» dum kiu la prezidanto pritraktis ĝian historion. Gr. Maertens ĝian esperanto-historion kaj R. Iserentant ĝian filatelion. Belegaj kolordiapozitivaj estis montrataj. La dekan de majo ni kune vizitis la jaran plezurfoiron. La deksepan estis debat-forumo pri «instruado; junularo». La temo estis tute ne elĉerpata. Ni devos havi duan tian vesperon pri tio. La lastan jaŭdon de la monato R. Martens donis ekzercojn pri nia lingvo laŭ lia jam bone konata gaja maniero. La 14an de junio, la festdirektoro A. Dumarey prezentis denove tre interesan kaj varian cerbo-gimnastikon. Tiuj vesperoj estas ĉiam tre instruaj kaj la konkurso inter la du grupoj streĉa! Dimanĉon la 24an ni havis la jaran aŭtobusekskurson. Ĝi iĝis duona malsukceso. Tro longa veturado; maloportuna tago por multaj inter ni

Ni devos estonte fari ĝin pli frue en la jaro. La lastan jaŭdon de junio, ree ekzercoj de R. Martens. Ili neniam enuigas pro la gajeco kaj ofte spriteco; kaj ni multe lernas. Dum la feriomonatoj julio kaj aŭgusto du kunvenoj. La 19an de julio ĉe Simonne De Koninck por muziki, kanti kt. Tre gaja vespero kun la kutima bonega regalado! La 23an de aŭgusto ni estis invitatitaj ĉe fraŭlino Chris Lefevere kie la regalado estis vere abunda kaj bongustega! Tutkoran dankon al Chris kaj al ŝia gastema kaj ankoraŭ korjuna patrino. Ni aŭdis raporton pri la universala kongreso kaj vidis tre belajn kolordiapozitivajn pri ĝi. Dum la somero ni daŭre Volley-Ball-ludis plene, dufoje en la semajno. En la unua venonta kunveno, ni aŭdos vojaĝraportojn de la gemembroj kiuj vojaĝis. La lastan jaŭdon de sept. venos S-ro M. Jaumotte por paroladi pri sia vojaĝo al Hungarujo kaj Ĉekoslovakujo. Dum la estrarkunveno de 30 aŭg. ni preparos la aŭtunan kurson kaj ni preparolos la laborplanon de UEA.

SE VI PAROLAS PRI STROVI... VI PENSAS PRI  
VIANDAJEJO. SE VI PENSAS PRI VIANDAJEJO... VI  
AĈETAS ĈE

**STROVI**

Vlamingstraat, 48 BRUGGE

STROVI - Varoj:

GARANTIO pri

bona kvalito

kaj bona prizorgado

Telefono: pogranda komerco 34559

detala » 33408

**STROVI estas unuaranga!**



- ★ POR VIAJ EKSTERLANDAJ  
TRANSPAGOJ
- ★ POR ŜANĜOJ EN LA PLEJ ALTA  
KURZO
- ★ POR VOJAĜDEVIZOJ

**Bank van Roeselare & Westvlaanderen**

Sidejo: **ROESELARE**

Noordstraat, 38 Belgujo

38 Agentejoj kaj oficejoj en la tuta provinco de Okcidentflandrujo.



manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



## VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



### PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen	: Aalmoezenterstr. 2 Abdijsr. 57 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9 Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Vote 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2